# *Akceptos Raúl Castro la prezidenton de Salvadoro.*



La salvadora prezidento, Salvador Sánchez Cerén, kiu plenumas oficialan viziton al Kubo, estos akceptita ?i-merkrede de la kuba prezidento Raúl Castro.

Marde, Sánchez Cerén ?uis la prezenton de la teatra grupo infana  La Colmenita, kaj anka? vizitis la Halon de la Ordeno III, en la konvento de San Francisko de Asis, sidejo de  tiu arta kaj docenta kolektivo.

Sánchez Cerén dankis la infanan grupon pro  “la animdonaco” kaj esprimis ke la edukado de la infanoj donas garantion pri la estonteco de la lando; li taksis la sperton de la grupo La Colmenita kiel grava, ne nur por Kubo sed anka? por la mondo. Li laboros por havi ion similan en Salvadoro, aldonis la prezidento.

Carlos Alberto Cremata, direktoro de la grupo, dankis al la centramerika gvidanto pro sia tempo en la unua tago de la vizito al la insulo, kaj pro la ?eesto al la prezento de tiu ?i arta kompanio, deklarita en 2007 kiel ambasadoroj de Bona Volo de la fonda?o por la infaneco de UN (UNICEF).

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/57306-akceptos-raul-castro-la-prezidenton-de-salvadoro

# Radio Habana Cuba